

6/2019

Novembro
Decembro

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ☆ Epoko de konsumado
- ☆ Krakova Esperantisto gvidas orkestron
- ☆ BET en malpli konata parto de Litovio

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Kunlaboro

Teresa Nemere, Magdalena Tataro,
Adam Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek- sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Katarzyna Choroszuca el Bjalistoko

Enhavo

Redaktoraĵoj	2
Estraro informas	
<i>PEA-estraro</i> , Aliĝilo por poloj al Germana Pola Esperanto-Kongreso 2020	3
Eventoj	
<i>Robert Kamiński</i> , BET en malpli konata parto de Litovio	3
<i>Adam Wilkus</i> , Krakova Esperantisto gvidas orkestron	8
Mojose	
<i>www.pej.pl</i> , Kurta vizito en Gdynia	9
Raportoj, rakontoj	
<i>pastro Kazimierz Noculak</i> , Kial homoj ĉesis skribi paperajn leterojn	10
Pri kio ni aŭdas	
<i>urania.edu.pl</i> , Preskaŭ 90.000 voĉoj por la nomo de la polaj kosmaj objektoj	11
<i>Tatara Magdalena</i> , Polo Witold Bańka - nova prezidanto de la Monda Agentejo	
Kontraŭ Dopado	12
<i>Agnieszka Nowak</i> , Ekzisto de la lunoj de Kordylewski estas konfirmita	14
<i>Anton Oberndorfer</i> , Savi malaperantajn lingvojn	16
Vizitindaj lokoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Stranga arbaro proksime al Gryfin	17
Homoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Jaro 2019 – la jaro de Marek Edelman	18
<i>Mariusz Żak</i> , Pri Johano Paŭlo la 2-a	21
Lingvosciencia angulo	
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, <i>De</i> rilate al verbo – unua parto	23
Literaturaĵoj	
Roman Dobrzyński, Kial kvarpiede?	24
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Epoko de konsumado	25
Leterkesto	
<i>Aleksandek Korĵenkov</i> , Fino de E-revuo "La Ondo de Esperanto"	27
<i>Teresa Pomorska</i> , Kristana Kongreso en Legnica	27
<i>Bharat</i> , Kvara Speciala Ekskurso al Nepalo en 2020j	28
<i>Maria Majerczak</i> , Esperanto-kurso por verkemuloj - gvidota vive, en Interreto	29
<i>Klubano</i> , Kluba vivo	30
Kalendaro	31
Oni eldonis	
"Adiaŭ Krakovo", „Historioj el Ĥelmo”, „Kuru, knabo, kuru”, "Bjalistokaj kajeroj nr 9"	33
Gazetaro pri E-movado	
Polsatnews, dzieje.pl, Kurier Poranny, TVP-3 Białystok	34
El fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki</i> , Esperanto - Forumo kaj Tagoj de A. Grabowski, 04.06.1988	36

Estimataj legantoj

Jam venis fino de la jaro. Tempo por resumo de jaraj atingoj kaj malsukcesoj. Fino de decembro estas ankaŭ tempo de ĝojo kaj festo. Ĉiu el ni scias, ke post la Kristnaska festo ni festas la novan jaron. Hodiaŭ estas bona okazo por esplori iomete historion kaj novjarajn kutimojn en aliaj mondopartoj. La novjaro estas internacia festo, kiu okazas la unuan de januaro laŭ la gregoria kalendaro.

La kutimo komenci la novan jaron de la unua tago de januaro devenas de antikva Romo, kies loĝantoj adoris tiun tagon nomatan *Janus*.

Kiel kaj kiam festas ne-katolikoj? Ortodoksaj kredantoj kaj grekaj katolikoj uzantaj la julian kalendaron bonvenigas novan jaron la 14-an de januaro (laŭ la gregoria kalendaro).

En Mahajana Budhismo (Ĉinio, Koreio, Tibeto, Nepalo, Mongolio, Vjetnamio kaj Japanio) novjaro okazas post la unua plena luno en januaro.

La ĉina novjaro estas decidita laŭ la ĉina kalendaro kaj kutime okazas dum la dua (de tempo al tempo dum la tria) „nova luno” de la luno post la vintra solstico, (du tempoj ĉ. 21-a de junio kaj 21-a de decembro), kiam suno estas plej malproksima de la ekvatoro kaj ŝajne haltas), kiu devas okazi en la dekunua luna monato.

Simile, oni festas la novjaron, (aŭ la festivalon de Têt) en Vjetnamio. Ankaŭ en Koreio ĝi estas movebla festo nomata *Seollal* kaj okazigita laŭ la korea luno-suna kalendaro.

En *Theravada* kaj *Hinayana* Budhismo (en Tajlando, Mjanmao, Srilanko, Laoso, Kamboĝo), tradicie novjaro komenciĝis kun la unua plena luno en aprilo, sed nuntempe ĝi havas fiksan daton.

La tradicia irana novjara festo estas *Nouruz* festata en la printempa ekvinokso.

Juda novjaro estas festo de *Roŝ Haŝana*. Laŭ la juda kalendaro, ĝi stas la unua tago de la jaro (kutime estas festata en la septembro aŭ oktobro).



Sendepende de la tempo de la festo, ĝi estu gaja, kaj pasigata inter amikoj. Ĝuste tian Kristnaskon kaj Novan Jaron deziras al vi la redakcio de Pola Esperantisto.

Robert Kamiński

PEA-estraro

Aliĝilo por poloj al Germana Pola Esperanto-Kongreso 2020 en interreto

Sur retejo de Pola Esperanto-Asocio www.esperanto.pl kaj fejsbuka retejo de PEA jam estas trovebla aliĝilo al Germana Pola Esperanto-Kongreso 2020, kiu okazos dum tagoj 29-a de majo ĝis 1-a de junio 2020. Post dulanda kongreso en samaj lokoj okazos kongreso de Internacia Fervoista Esperanto-Federacio. La kongresoj okazos en Frankfurto ĉe Odoro kaj en Słubice. Pro la fakto, ke la kongreso okazos en du landoj, la partoprena prezo estas sufiĉe alta kompare kun polaj kongresoj. Partoprenkontizo por poloj en unua tempoperiodo ĝis 10.01.2020 estas 45 eŭroj.

Ni petas esperantistojn, kiuj volas ĉeesti la kongreson aliĝi kiel eble plej frue. Ĉi tiu prezo estas antaŭvidita por PEA-membroj. Se iu ne estas PEA-membro, povas fariĝi individua PEA-membro. La membrotito por 2020j estas 30 zł. - plena kotizo kaj 15 zł rabatita (pensiuloj, emeritoj, senlaboruloj, junuloj ĝis 16-jaraĝo).

Apude vi ankaŭ trovos priskribon kiel mendi tronoktlokon en studentaj domoj en Słubice. Pri interesa programo de la kongreso ni skribos en sekva Pola Esperantisto.

Ni korege invitas vin al tiu eksterordinara kongreso.

Transporta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020



Eventoj

Robert Kamiński

BET 55 en malpli konata parto de Litovio

Kien vojaĝi en la jaro 2019? Kiel ĉiujare, mi pensis pri tio jam dum vintro. Ĉu elekti la Universalan Kongreson en Finnlando, ĉu eble varman

Italion kaj italan kongreson? Post interesaj kaj varmaj kongresoj en du najbaraj landoj - Hispanio kaj Portugalio en 2018, mi decidis vojaĝi al nia najbara lando Litovio. Prezroj estis pli favoraj ol en Skandinavio kaj oni devas iom ripozi de grandaj E-aranĝoj. Mi elektis la jubilean aranĝon: 55-aj Baltiaj Esperanto Tagoj. BET, jam de jaroj havas bonan opinion, grandparte dank' al prezidanto de Litova Esperanto Ligo, Povilas Jegorovas. Ĉijara aranĝo estis impresa kaj grava por esperantujo pro interesa kaj riĉa programo. Mi jam unufoje partoprenis en BET en Kaunas kaj miaj impresoj estis tre bonaj. Mia antaŭa vizito en Vilno kaj partopreno en la kongreso de Esperantistaj ĵurnalistoj ankaŭ estis tre impresa.



Ĉijara BET okazis en Panevėžis - por ni tute nekonata urbo, kiu situas en la norda parto de Litovio. Kiel veturi al tiu malproksima loko? Post trarigado de la trafikaj vojaĝeblecoj, okazis, ke la plej rapida vojaĝo eblas per la propra auto. Kvinopo de polaj samideanoj renkontiĝis en Varsovio kaj ni senhalte vojaĝis al Litovio.

Ni venis posttagmeze rekte al BET-ejo, kiu troviĝis en la konstruaĵo de Politeknika Universitato el Kaunas. Ni registriĝis en la laŭta akceptejo, kie ni ricevis loĝlokojn en du malproksimaj partoj de la urbo. Unue mi planis partopreni en malgranda trankvila aranĝo. Poste, dum monatoj, mi

observis, ke la nombro de aliĝintoj rapide kreskis kaj atingis surprize 450 personoj. Laŭ mia opinio, tiu grandega grupo estis problemo por organizantoj. Ili devis trovi multajn noktejojn en la urbo, kiu gastigas relative malmultajn turistojn. Finfine mi ricevis bonan tranoktlokon en la sporta hotelo. Dum la unua vespero la organizantoj per busetoj veturigis esperantistojn al la malproksimaj tranoktejoj. Poste ni devis memzorge trovi la ĝustan vojon kaj trafikajn konjektojn. En la akceptejoj ni ricevis sakon kun kelkaj eldonaĵoj. La plej interesa estis BET-libro, kiu kronike priskribis programon kaj ĉiujn BET-aranĝojn, okazintaj dum 60 jaroj. Bedaŭrinde, gravaj por ni informoj pri la urba trafiko, antikvaĵoj kaj situo de tranoktejoj estis nesufiĉaj. Prezentitaj en ĝi mapetoj estis tute nelegeblaj kaj ni devis uzi Google-mapojn en niaj propraj poŝtelefonoj, por trovi vojojn al BET-ejo kaj manĝejo. Oni povus prepari simplan fotokopion de la urba plano en formato A-3 kun legeblaj indikoj, kie troviĝas gravaj lokoj por partoprenantoj kaj kiaj buslinioj veturas al renkontiĝejo.



La oficiala malfermo de la 55-a BET estis tre impona kaj interesa. Ĉiuj venis al la granda, komunuma kulturcentro, kie bonvenigis nin la urbestro de Panevėžis - Rytis Račkauskas, la organizantoj kaj grupoj de litovaj artistoj. Kantis kaj dancis por ni interesaj ensembloj: granda koruso *Ĉiŭto*, vokala ensemblo *Smiltelė*, kaj popolaj dancensembloj *Verdenė* kaj *Linās*. Post arta programo, la urbestro invitis ĉiujn al bankedo.

Ĉiutagaj programoj estis interesaj kaj abundaj. Ne eblus aŭskulti ĉiujn prelegojn. Mi elektis kelkajn, interalie prelegserion de Amri Wandel pri kosmaj teleskopoj. Sciencaj prelegoj okazis kadre de la Somera Universitato, simila al tiu, kiu kutime estas organizata dum Universalaj Kongresoj. Ĉiuvespere, en la plej granda salono de BET-ejo, okazis muzikkoncertoj. Du la plej altnivelaj koncertoj de koreaj artistoj okazis en la komunuma kulturcentro ĉe la str. Kranto. Ili ambaŭ estis por mi granda surprizo. Mi jam longe ne aŭdis tiel profesie prezentitaj esperantlingvajn kantojn. Unue kantis poeziajn kantojn Kyung Ok „Amira”, kiu estas profesia kantistino kaj eklernis Esperanton antaŭ du jaroj. Tre plaĉis al mi ankaŭ la koncerto de la dueto Jogaile Čojūtė kaj Sung Min-woo. Oni ankaŭ povis aŭskulti koncertojn de jam konataj E-muzikistoj, kiel Asorti, Mikaelo Bronštejn, Kaŝi, Zuza Kornicka kaj aliaj.



Dum la ekskursita tago nia grupeto volis turismi kun aliaj esperantistoj. Bedaŭrinde, dum la dua tago jam ne eblis aliĝi al ekskursoj. Tio estas malbona surprizo. Multaj esperantistoj demandis pri la ebleco partopreni en ekskursoj. Mi bedaŭras, ke organizantoj antaŭvidante grandan nombron de partoprenantoj ne preparis rezervan liston de ekskursanoj kiu ebligis mendi kroman buson. Finfine, ĉiuj, kiuj ne povis ekskursi, devis zorgi pri turismo memstare. En BET-libro ni trovis preskaŭ neniun proponon kaj priskribon, kio estas interesa en Panevėžis-regiono. Ni elektis la urbon Anykščiai (pole Onykszty) kaj ĝian regionan naturparkon. Post vizito en la urba preĝejo kaj muzeo de anĝeloj ni vojaĝis al belega loko ĉe la rivero „Sankta”. Sur la monta deklivo, dek metrojn super la tero, oni konstruis sur metalaj apogiloj kelkcentmetra itinero inter kronoj de arboj. La itinero gvidas turistojn al la alta panorama turo. Tiu bela kaj unika loko estas vere vizitebla.

Etoso de la aranĝo estis tre bona kaj interesa kaj mi povas kore rekomendi BET al aliaj esperantistoj. Tamen, mi povas rekomendi BET nur al personoj, kiuj ne havas altajn kulinarnajn postulojn. La manĝaĵoj, proponitaj al BET-anoj, estis strangaj kaj nesufiĉaj. Ĉiuj devis manĝi en alia domo de la Politekniko, 500 metrojn de la BET-ejo. La sekvan malfacilaĵon kaŭzis de la urba trafiko. La lasta buso al nia tranoktejo veturis je la 21-a horo. Ofte vesperaj koncertoj finiĝis eĉ post la 22-a, kaj ni vole nevole devis marŝi 30 minutojn tra la urbo.

La urbo Panevėžis ne estas turisme tre interesa. Tamen, ni vizitis kelkajn belajn objektojn. Dum la promendo en la urbo mi ekvidis arkitekture interesan konstruaĵon kun la grandega vitralo. Proksimiĝinte al la moderna enirejo, mi trovis la informon, ke la konstruaĵo estas domo por geedziĝoj. Kiam mi eniris la grandan antaŭsalonon, venis al mi simpatia virino kaj ĉiĉeronis min en la moderna kaj eksterordinara objekto. La konstruaĵo havas du ĉambrojn por ĝeedziĝceremonioj, bele ornamitaj per modernaj vitraloj kaj lignaj ornamaĵoj.

En la bela katedralo okazis esperantlingva diservo, en kiu partoprenis granda grupo de esperantistoj. En la centro de la urbo situas malgranda moderna kvartalo kaj apud ĝi miksaĵo de malnovaj lignaj kaj masonitaj domoj. Ĉio ĉi estas ĉirkaŭita per grandaj kvartaloj de blokdomoj. Trans la urbo fluas la rivero Nevėžis, apud kiu troviĝas du belaj parkoj. En la norda kvartalo, sur la rivero, estas konstruita artefarita lago. La urbo estas grava kultura centro kaj en ĝi laboras kelkaj teatroj kaj muzeoj. Bedaŭrine, pro la somera ripozo kaj riparlaboroj, ne eblis ilin viziti.

Resumante, mi povas diri, ke mi estas kontenta pro mia vizito en Panevėžis kaj partopreno en la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Mi ĉiam, kun plezuro, trovas novajn lokojn kaj renkontiĝas kun novaj amikoj. La BET "vojaĝanta" tra Litovio, Latvio kaj Estonio estas tre bona por tiaj spertoj. Mi certe partoprenos en la aranĝo en venontaj jaroj.

Adam Wilkus

Krakova Esperantisto guidas orkestron

La 15-an de novembro 2019, mi, kune kun la samideano Leszek Kordylewski (pola-usona sciencisto kaj esperantisto, filo de la astronomo Kazimierz Kordylewski, kiu malkovris la polvajn lunojn de Tero, t.n. lunoj de Kordylewski), ĝuis en Krakovo belan muzikadon de la orkestro, sub la gvido de la taktobastono de Joachim Kołpanowicz, dum la spektaklo de la amuza opero "Fantoma nobeldomo" de S. Moniuszko.



Joachim Kołpanowicz, la orkestrestro, kiu estas filo de la forpasinta, eminenta artisto-pentristo kaj tre aktiva esperantisto - Andrzej Kołpanowicz, bonege parolas la internacian lingvon. Li multfoje kontribuis al Esperantaj Tagoj de Krakovo, pliriĉigante la artan programon per siaj piano-konzertoj, kelkfoje akompanata de la ludanta violonon lia fratino Julia, kaj rakontis pri la prezentataj muzikverkoj en Esperanto. Mi kore rekomendas la belajn koncertojn de la samideano Joachim.

Ĉeokaze permesu al mi menci, ke en la urbo Krakovo, dum la 8-a UK, okazinta en 1912, en kiu partoprenis L.L. Zamenhof, oni prezentis alian verkon de S. Moniuszko - la operon "Halka" en la lingvo Esperanto.

Mojose

www.pej.pl

Kurta vizito en Gdynia

Malgraŭ intensaj preparoj por la decembro-semajno kun Esperanto en Karlów (JES!), Ni sukcesis viziti por momento Gdynia kaj subteni lokan klubon dum renkontiĝo kun junuloj interesitaj pri lernado de Esperanto.

Ni esperas, ke venontjare ni fine povos organizi junularan eventon ĉe la marbordo!

Intertempe ni memorigas vin, ke antaŭ la 13-a de decembro vi povas decidi pasigi novjaran vesperon kun ni.



Renkontiĝo en la Gdynia Centro de Neregistraj Organizaĵoj
kun Pola Esperanto-Junularo kaj junulo el Gdynia - kiu interesiĝis pri Esperanto

pastro Kazimierz Noculak

Kial homoj ĉesis skribi paperajn leterojn

Laŭ mi tre grava kaj aktuala demando. Antaŭ nelonge en la internacia retradio aperis sonartikolo de Paulo Sergio Diana el Brazilo sub la titolo: "kien malaperis la tradiciaj leteroj". En la kvara numero de Pola Esperantisto Robert Kamiński demandas: Karaj Samideanoj, ĉu vi korespondas kun aliaj esperantistoj? La sonartikolo de Diana kaj respondoj: "ke tio jam ne estas moda" aŭ "mi ne havas tempon oni korespondis en pasinteco" ktp inspiris min skribi ĉi tiun artikolon.

Unue mi devas konfesi, ke mi ŝatas skribi la paperajn leterojn. Due, dank al paperaj leteroj mi interkonatiĝis kun multege da geesperantistoj el diversaj landoj kaj kiel aŭtodidakto nun mi povas regi la E. lingvon sufiĉe bone.

Homoj ekkomencas skribi leterojn en la diversaj periodoj de sia vivo. Iuj tre frue, eĉ kiel infanoj. Aliaj pli malfrue. Skribado la leterojn alportas al mi grandajn ĝojon kaj plezuron. Ĉiam kun malpacienco kaj batado de mia koro mi atendas

Homoj komencas skribi leterojn en diversaj periodoj de sia vivo. Iuj tre frue, eĉ kiel infanoj. Aliaj pli malfrue. Skribado de la leteroj alportas al mi grandan ĝojon kaj plezuron. Ĉiam kun malpacienco kaj batado de mia koro mi atendas leterojn de miaj geamikoj. Imagu, la paperajn leterojn oni ne skribas mekanike, oni bezonas iom da tempo por primediti, pripensi kaj por selekti vortojn.

La paperaj leteroj estas vivoplenaj. La vortoj, kiuj mi skribas sur la papero estas varmaj, vivaj, amaj, ĉiam ili eliras el la profundo de mia koro kaj animo. La leteroj, kiujn oni skribas per elektronikaj iloj estas artefaritaj.

Tiamaniere skribitaj leterojn mi ne kuraĝus nomi leteroj. Ili estas nur mekanikaj mesaĝoj. Mi tuj devas klarigi, ke mi ne estas kontraŭulo de elektronikaj komunikiloj. Ne! Mi ankaŭ uzas ilin, sed kun plena konscio mi konstatas, ke ili, malgraŭ ĉio, iom minacas homojn, precipe infanojn kaj

junularon. Pri la minacoj nun pli kaj pli laŭte avertas pedagogoj, psikologoj ktp. Ili eĉ alarmas. La genujuloj tro multe da tempo sidas ĉe komputiloj. Al ili ofte mankas la tempo por interparoli kun gepatroj, gefratoj kaj gekolegoj. Ili preskaŭ ne forlasas siajn ĉambrojn por ĝui freŝan aeron. Terure! Ĉu tiam gepatroj pensas pri sano de siaj infanoj?

Ĉu vi scias, ke nun en Pollando oni entreprenas certajn agadojn kaj iniciatojn per kiuj oni intencas stimuli kaj konvinki la gejunulojn al skribado de la tradiciaj leteroj, poŝtkartoj. Nun ekfunkciis la tutpollanda iniciato: „Proksimiĝas festoj - ne pri „sms“ memoru, sed pri poŝtkarto”. Ege interesa iniciativo. Ĝi estas kampanio dank’ al kiu aŭtoroj volas atentigi polajn familiojn, kiel grava estas la kutimo skribi tradiciajn leterojn kaj poŝtkartojn. Gelernantoj ricevas en lernejoj senpagajn poŝtkartojn kaj kune kun siaj gepatroj skribas festajn bondezirojn. Ankaŭ oni organizas konkurson por la plej bela kristanska poŝtkarto.

Je la fino mi fortege substrekas: la tradicia letero esprimas la plej grandan estimon al niaj karaj geamikoj. Tial malfermu pordegojn kaj pordojn de miaj hejmoj, ĉar longe atendata leterportisto alvenos. Brave Robert, pro via ege grava kaj aktuala demando: “Karaj samideanoj, ĉu vi koresponas kun aliaj esperantistoj?”

Pri kio ni aŭdas

<https://www.uraniam.edu.pl>

Tradukis *Robert Kamiński*

Preskaŭ 90.000 voĉoj por la nomoj de la polaj kosmaj objektoj

Okaze de sia jarcenta jubileo, la Internacia Astronomia Unio (IAU), kiu kunvenigas profesiajn astronomojn de la tuta mondo, organizis agadon, nomata IAU100, kun kelkaj iniciatoj promociantaj astronomion kaj konon de la universo. Unu el la projektoj, kadre de la IAU100, estas la eblo nomi planedojn kaj stelojn. Al ĉiu lando en la mondo estas asignita unu planeda sistemo, por kiu la lando aranĝis sian propran konkurson.

Pollando ricevis la sistemon de BD + 14 4559, en kiu troviĝas planedo, malkovrita kiel parto de la speciala serĉprogramo de ekstersonaj planedoj,

fare de la teamo de polaj astronomoj: prof. Andrzej Niedzielski, d-ro Grzegorz Nowak, d-ro Monika Adamów kaj prof. Aleksander Wolszczan.

La stelo el ĉi tiu sistemo nun videblas sur la ĉielo, en la konstelacio Pegazo. Nuntempe ĝi estas videbla el Pollando vespere, helpe de binoklo aŭ amatora teleskopo. Ĝia planedo havas mason kaj dimensiojn similaj tiuj de Jupitero.

La pola parto de la konkurso estas organizata kunlabore kun la Pola Astronomia Societo. En la unua etapo de la konkurso,



INTERNATIONAL
ASTRONOMICAL
UNION
1919-2019

kiu daŭris en junio kaj julio, ĉiuj povis sendi sian proponon por nomoj de la planedo kaj la stelo. Venis pli ol 2.800 proponoj. Poste, la konkursa komitato kontrolis la proponojn kaj elektis sep parojn de nomoj por la dua etapo – la publika, interreta voĉdonado.

La proponoj estis kolektitaj dum septembro kaj oktobro per la retejo www.iau100.pl/planety. La nomoj, inter kiuj oni povis elekti, estis: Geralt kaj Ciri, Jantar kaj Wolin, Piast kaj Lech, Polon kaj Rad, Solaris kaj Pirx, Swarog kaj Weles, Twardowski kaj Boruta (la unuaj estas proponoj por la nomo de la stelo kaj la duaj por la nomo de la planedo). La voĉdonado finiĝis la 31-an de oktobro 2019. La organizantoj ricevis 88.162 voĉojn.

"Ni dankas al ĉiuj pro la multnombra partopreno en la konkurso pri polaj nomoj por la planedo kaj la stelo. La fina rezulto estos anoncita post kelkaj semajnoj, decembre 2019, kiam la Internacia Astronomia Unio oficiale anoncos la nomojn, elektitaj de ĉiuj landoj" diris doktoro Krzysztof Czart, la prezidanto de la pola konkursa komitato IAU100 NomoExoWorlds

Magdalena Tatara

Polo Witold Bańka - nova prezidanto de la Monda Agentejo Kontraŭ Dopado

Printempe 2019 la pola ministro de sporto kaj turismo Witold Bańka estis elektita prezidanto de la Monda Agentejo Kontraŭ Dopado (angle: WADA). Sian postenon li ekprenos la 1-an de januaro 2020.

35-jara Witold Bańka estas ministro de sporto kaj turismo ekde aŭtuno 2015, antaŭe li estis profesia sportisto, kiu specializiĝis en la kuro de 400 metroj. En la sporta kariero, lia plej valora atingo estis bronza medalo de la monda ĉampionado en stafetkuro 4 x 400 m, gajnita en Osako (Japanio) 2007, (li partoprenis en la duonfinala kuro).

WADA - Monda Agentejo Kontraŭ Dopado estas organizaĵo, fondita en 1999, kun apogo de la Internacia Olimpika Komitato, kies celo estas lukto kontraŭ nelegala subtenado en sporto. La Agentejo prilaboras procedurojn kaj regulojn kontraŭ-dopadaj, ĝi ankaŭ decidas kaj fiksas la liston de malpermesitaj substancoj en sporto kaj liveras licencojn al naciaj kontraŭdopadaj laboratorioj.

La polo estas kvara prezidanto de WADA, antaŭ li tiun funkcion plenumis reprezentantoj de Kanado, Aŭstralio kaj Granda Britujo. La prezidanto estas elektata por tri jaroj, sed kutime tiu periodo estas



daŭrigata dum tri sekvaj jaroj. La estro de WADA - alterne - fariĝas kandidato, nomumita de la olimpika movado kaj de naciaj registaroj. Nun estis la vico de politikisto. Registraraj oficialuloj volis elekti nekonflikteman kandidaton. Aperis ankaŭ la koncepto pri revigligo de la organizaĵo. Witold Bańka jam kunlaboris mallonge kun WADA en 2017 kaj tiam li montriĝis kiel homo kompromisema,

kiu bone kunlaboras kun ĉiuj.

Ĉefaj taskoj de la nova prezidanto estas: plifortigado de naciaj filioj de WADA, plimultigo de akredititaj kontraŭdopadaj laboratorioj, plia engaĝiĝo de sportistoj en la batalo kontraŭ dopado en sporto kaj zorgado pri la proksima kunlaboro inter registaroj, sporta movado kaj Naciaj Kontraŭdopadaj Organizaĵoj.

Ekzisto de la lunoj de Kordylewski estas konfirmata

Mia patro Kazimierz Kordylewski estis esperantisto, kiu neniam parolis Esperanton, sed uzis ĝin skribe, ankaŭ en siaj publikaĵoj. Li instigis min mastrumi la Internacian Lingvon, kiun mi praktikis poste kun mia patrino Jadwiga, ankaŭ astronomo, vojaĝante eksterlanden kun Esperanto. Ambaŭ miaj gepatroj penis ekobservi kaj foti la ekzistantajn planedetojn nomataj "Esperanto" kaj "Zamenhof". Ili publikigis artikolon pri tio en la zagreba popularscienca esperantlingva revuo "Homo kaj Kosmo".

Leszek Kordylewski

Teamo de hungaraj astronomoj kaj fizikistoj povis konfirmi du nekapteblaj polvajn nubojn ĉe Lagrange'a - punktoj, nur 400.000 km de la Tero. La nuboj, unue priskribitaj kaj nomitaj de la pola astronomo **Kazimierz Kordylewski** en 1956, estas ege malfortaj, tial ilia ekzisto estas diskutibla. La nova verko aperis en la revuo *Monthly Notices de la Royal Astronomical Society*.

La sistemo Tero-Luno havas kvin t.n. libraciajn punktojn (Lagrange'a - punktoj) en kiuj gravitaj fortoj konservas la relativan pozicion de objektoj tie metitaj. Du el ĉi tiuj punktoj, L4 kaj L5, formas kun la Tero kaj la Luno la egallateran triangulon kaj moviĝas ĉirkaŭ la Tero dum la Luno moviĝas en orbito.

L4 kaj L5 ne estas tute stabilaj, ĉar ili estas ĝenataj de la gravito de la Suno. Tamen oni opinias, ke tio estas lokoj, kiuj, almenaŭ portempe, povas amasigi interplanedan polvon. Kordylewski rimarkis du proksimajn polvonebulojn ĉe L5 en 1956 kaj fotis ilin en 1961, sed ilia ekstrema malforto malfaciligas ilin trovi, kaj multaj sciencistoj dubis pri ilia ekzisto.

En la-ĉijara publikaĵo de la hungara teamo, gvidata de Gábor Horváth de la Universitato Eötvös Loránd, komputile modeligis la nubojn de Kordylewski por taksi kiel ili formiĝas kaj kiel ili povas esti troveblaj. La sciencistoj interesiĝis pri tio, kiel ili aspektas rigardataj per polarigaj filtriloj, kiuj transdonas lumon je specifa vibra direkto, simila al tiu trovata



en kelkaj specoj de sunokulvitroj. Disĵetita aŭ reflektita lumo estas ĉiam pli malpli polarigita, laŭ la angulo de disĵetado aŭ reflektito.

Sekve ili decidis trovi ĉi tiujn polvajn nubojn. Kun lineare polarizanta filtrilo, ligita al la fotila objektivo kaj CCD-detektilo, en la privata observatorio Slíz-Balogh en Hungario. La esploristoj fotis la supozitan lokon de Kordylewski-nuboj en la punkto L5.

La akiritaj bildoj montras polarigitan lumon reflektitan de la polvo, etendiĝanta preter la vidkampo de la fotila lenso. La observita modelo kongruas kun la prognozaj de la sama grupo de esploristoj dum la pli frua laboro kaj konformas al la plej fruaj observoj de la polvaj nuboj de Kordylewski antaŭ ses jardekoj. La grupo de Horváth povis ekskludi optikajn artefaktojn kaj aliajn efikojn, kio signifas, ke la ekzisto de polvo-nuboj estas konfirmita.

Judit Slíz-Balogh komentas ilian malkovron: "La nuboj de Kordylewski estas du la plej malfacilaj objektoj por trovi, kaj, kvankam ili estas tiel proksimaj al la Tero kiel la Luno, ili estas plejparte preterlasataj de esploristoj. Intriganta estas la atesto, ke nia planedo havas polvajn pseŭdosatelitojn en orbito apud nia luna najbaro."

Atentante ilian stabilecon, punktoj L4 kaj L5 estas rigardataj kiel eblaj lokoj por orbitaj spacaj sondoj kaj kiel transigaj stacioj por misioj esplorantaj pli larĝan sunsistemon. Estontaj esploroj koncernos L4 kaj L5 kaj kunligitaj kun ĝi polajn nubojn de Kordylewski por kompreni, kial ili stabilas, kaj ĉu ilia polvo estas minaca por ekipaĵoj kaj estontaj astronautoj.




Foto: RAS

Sur la foto: arta bildo de Kordylewski-nuboj en la nokta ĉielo (ilia brileco multe plibonigita) dum observado. Fonto: G. Horváth

Savi malaperantajn lingvojn

Kiam lingvoj mortas, tiam ofte perdiĝas la tuta kulturo. Por haltigi la finfinan malaperon de minacataj lingvoj, ili hodiaŭ estas dokumentataj de ekspertoj kaj estas kolektataj en arkivoj.

En la mondo ekzistas ĉirkaŭ 7000 lingvoj, 3000 el ili estas konsiderataj kiel minacataj, diras lingvistino ĉe la arkivo por minacataj lingvoj de la SOAS-universitato de Londono. Ĉu lingvo estas minacata, tio tamen ne dependas de la nombro de ĝiaj parolantoj, ŝi opinias. Precipe en Afriko ekzistas multaj lingvoj, kiuj estas parolataj de nur ĉirkaŭ 500 homoj, sed ne estas minacataj.

Grava kriterio por la statuso "minacata" estas, laŭ la lingvistino, la vivanteco de la lingvo: "Ekzemple se la lingvo ne plu estas pludonata en la familio. Tia lingvo estos minacata post unu aŭ du generacioj".

Ankaŭ se lingvo ne plu estas uzata en ĉiuj vivosferoj, sed ekzemple en la profesia sfero estas anstataŭata de alia lingvo, tiam povas aperi danĝero. Kiel lingvo povas disvastiĝi kaj fine morti, tion montras la lingvistino ĉe la ekzemplo de la portugala "Minderico". Origine tio estis la sekreta lingvo, ĝi enhavas portugaliajn kaj arabajn elementojn kaj estis parolata unue de komercistoj kaj produktantoj, kiuj vivis en la regiono de Minde en la centro de Portugalio kaj volis komunikiĝi inter si.

La unuaj skribaj atestoj ekzistas el la frua 18-a jarcento, sed parolata estis "Minderico" jam signife pli frue, supozas la lingvistino. "La lingvo estis uzata de teksaĵo-komercistoj kaj -produktantoj kaj tiam malrapide fariĝis lingvo de la komunumo. Dum ĝia plej forta periodo, "Minderico" estis parolata de proksimume 8000 homoj kaj tio okazis en la ĉiutago kaj en la profesio. Hodiaŭ restas ankoraŭ ĉirkaŭ 150 parolantoj. Multaj el ili formigris kaj aliaj ne plu donas la lingvon al siaj idoj."



La lingvistino nun dokumentas la lingvon. Apud vortaro apartenas al tio ankaŭ videofilmoj. "Ni parolas per la manoj, per nia korpo, lingvo estas ne nur abstrakta sistemo de reguloj, ne nur gramatiko", ŝi klarigas. En la videoregistraĵoj oni povas observi la parolantojn de "Minderico" dum gestumado, dum la perokula kontakto kaj dum la korpa sintenado.

Oni povas trovi tiun lingvon en la arkivo por minacataj lingvoj de la SOAS universitato de Londono. La tiea datumbanko estas libere alirebla. Ĉirkaŭ 450 lingvoj estis tie jam elvokeblaj. Plej multaj el ili venas de transoceanaj landoj, el Afriko kaj Sudameriko. Eŭropo mem ne havas aparte grandan diversecon de lingvoj, ŝi opinias. Proksimume 300 lingvoj ekzistas en Eŭropo, kiom el ili estas minacataj, tio estas malklara. "Kelkaj homoj diras, ke en Eŭropo nur naŭ lingvoj estas minacataj, sed tio ne povas esti vero, mi jam dum konferenco faris malgrandan enketon kaj jam atingis la nombron de 11", ŝi klarigas.

La "lingvosavantoj" ne celas unuavice revivigi lingvojn, do strebi, ke la lingvoj estu denove ĉiutage parolataj. Ili dokumentas kaj arkivigas. Ĉu lingvo estas parolata plue, tio dependas de la homoj en la koncerna loko. Sed ankaŭ tie povas esti avantaĝo, se pli posta generacio povos elvoki la tutan vortotrezoron de sia lingvo el la interreto.

Vizitindaj lokoj

Robert Kamiński

Stranga arbaro proksime al Gryfin

Proksime al Gryfin en la Okcidenta Pomerio, kreskas nekutima kurba arbaro. En la areo de ĉirkaŭ 0,3 ha troviĝas kelkcent kurbigintaj pinoj. Apud la grundo la arboj kliniĝas ĉirkaŭ 90°, formante duoncirklon de la pli supra parto de la trunko. Ĉiuj trunkoj estas fleksitaj norden. La kialo de fenomeno de ĉi tiu mistera arbaro ne estas tute konata. Verŝajne, la strangaj formoj estas rezulto de la homa interveno en la 1930-aj jaroj. La nekutima formo povis esti speciale kreita, kun la intenco de posta uzo en produktado de mebloj aŭ ŝipoj. La kurba arbaro estas hodiaŭ konsiderata kiel monumento de naturo.



Homoj

Robert Kamiński

Jaro 2019 – la jaro de Marek Edelman

En la jaro 2019 oni festas la centjaran datrevenon de naskiĝo kaj la dekan datrevenon de morto de la legenda gvidanto de ribelo en varsovia geto, kuracisto kaj soci-politika aktivulo. Laŭ la rezolucio de la urbaj aŭtoritatoj, akceptitaj la 4-an de januaro en Łódź (Lodzo) kaj la 24-an de januaro en Varsovio, por omaĝi ĉi tiun grandan polon, kiu batalis por libereco kaj demokratio dum sia tuta vivo, la jaro 2019 estis anoncita kiel la Jaro de Marek Edelman.

Marek Edelman, "Marek" (naskiĝis la 1-an de januaro 1919 en Homel - mortis 2-an de oktobro 2009 en Varsovio) - estis unu el gvidantoj de la ribelo en varsovia geto, kaj partoprenanto de la Varsovia Ribelo en 1944,

kardiologo, pola socia kaj politika juddevena aktivulo, ankaŭ la Honora Civitano de Varsovio.

Dum junaĝo Marek Edelman apartenis al la *Jugnt Bund*, la junulara organizaĵo de la laborista partio *Bund*. Dum la milito li aktivis en la sekretaj vicoj de *Cukunft*, li laboris ĉe la Infana Hospitalo je la nomo de Bersohn kaj Bauman, li redaktis kaj eldonadis konspiran gazeton en la varsovia geto.



Li estis unu el la komandantoj de la **Juda Batala Organizaĵo - pole ŻOB**, dum la ribelo en la varsovia geto li komandis batalantojn en la tiel nomata brosa fabriko. Post la morto de Mordechaj Anielewicz, li fariĝis komandanto de la ribelo. La 9-an de majo 1943, kune kun aliaj batalantoj, li eskapis tra la substrataj kanaloj el la geto.

Li partoprenis en la varsovia ribelo en la vicoj de la Popola Armeo en la kvartaloj Malnova Urbo kaj Żoliborz.

Post la milito li restis en Pollando. Li ekloĝis en Łódź, kie li laboris kiel kardiokirurgo. Li estis aktivulo de la pola opozicio dum la tempo de Pola Popola Respubliko (PRL), li estis premiita per kelkaj medaloj, i. a. M. Edelman ricevis la ordenon Honoran Legion de prezidento de Francio (2008) kaj la titolon honordoktoron de la Universitato en Yale (Usono, 1989), Université Libre en Bruselo, Medicina Universitato en Łódź (2007) kaj Jagelona Universitato en Krakovo (2009).

En 1999, en Łódź, li fariĝis *civitano de la jaro*. Li notis siajn rememorojn pri la milittempo.

M. Edelman estas entombigita en la Juda tombejo, ĉe str. Okopowa en Varsovio, najbare al aliaj *Bund*-membroj.

Dum sia tuta vivo li batalis kaj parolis nome de malfortuloj kaj viktimoj. Li batalis por la homa digno kaj libereco, kion li plurfoje substrekis en parolaj kaj skribaj eldiroj. Ekzemplo de liaj agoj estas la apelacio al NATO-estroj, en aprilo 1999, por ĉesigi la aerajn bombadojn en




Foto Katarzyna Łukasik

Kosovo, kiu estis publikigita en la plej gravaj gazetoj en Okcidenta Eŭropo. Li vojaĝis kun konvojo de la humana helpo al Sarajevo.

Per vortoj kaj agoj, li memorigis la tragedion de judoj, mortigitaj dum la dua mondmilito. Li parolis nome de ili kaj honorigis memoron pri ili. Post 1949, kiam *Bund* ĉesis ekzisti en Pollando kaj plej multaj ĝiaj aktivuloj elmigris, li decidis daŭrigi sian rolon kiel gardisto de la tomboj de pereintoj.

Ĝis la fino de sia vivo li estis socia aktivulo batalanta por la rajtoj de malfortuloj kaj sub-premitoj. Li diris, ke libereco estas la plej grava afero en vivo de ĉiuj homoj.

Se estas homoj, kiuj ne scias, kiu estis Marek Edelman, oni devas rememori, ke li estis eksterordinara homo, kiu batalis por libereco. Li diris laŭte pri la malbono, batalis kontraŭ ĝi kaj ne volis esti indiferenta pri ĝi. Li ripetadis, ke indiferenteco estas akcepto de la malbono kaj neniam akceptis moralajn kompromisojn.

Unu el liaj konataj citaĵoj estas:

"Ni devas instrui en lernejoj, en infanĝardenoj kaj en universitatoj, ke malbono estas malbono, ke malamo estas malbono kaj ke amo estas devo."

Unu el la institucioj, kiu aktive kultivas la memoron pri tiu granda polo, estas la Muzeo de la Urbo Łódź, kie okazas multaj edukaj okupoj kaj samtempe oni povas viziti la kabineton de Marek Edelman, kie estas prezentitaj memoraĵoj pri li.


En Łódź ekzistas ankaŭ la **Dialoga Centro Marek Edelman** - la urba kultura institucio, ekzistanta ekde 2010, kies celo estas akceli la multkulturan kaj multetnan heredaĵon de la urbo, kun aparta emfazo al la juda kulturo kaj aliaj kulturoj, kiuj havas gravan efikon dum disvolviĝo de la urbo.



Foto Vikimapia.org

Pri Johano Paŭlo la 2-a

Alproksimiĝas la jaro 2020 kaj la centa naskiĝdatreveno de la eksterordinara papo - Johano Paŭlo la 2-a. Estas nediskutebla en la mondo, ke la elekto de polo, Karol Wojtyła, por esti papo, kaj lia pontifikado, plejparte kontribuis al la falo de komunismo en Eŭropo kaj al la reveno de libereco kaj demokratio en ĉi tiu regiono de la mondo. Certe multaj poloj bone konas vivon de la papo. Tamen, mi pensas, ke okaze de tiu granda jubileo indas almenaŭ mallonge rememori lian vivon.



Johano Paŭlo la 2-a (Karol Wojtyła) naskiĝis en la amata de li urbo Wadowice, en 1920. Li havis pli aĝan fraton Edmund, kiu kiel kuracisto, laboris interalie en hospitalo en Bielsko-Biała kaj la fratino Olga, kiu mortis tuj post la naskiĝo. Edmund transdonis al Karol amon al montaraj promenadoj, kiujn li praktikis.

En la jaro 1938, Karol Wojtyła komencis studi polan filologion en la Jagelona Universitato en Krakovo. Sed en 1939, komenciĝis la dua mondmilito kaj la universitato estis fermita. Karol laboris kiel manlaboristo en ŝtonminejo kaj en la kemia fabriko Solvay. Li samtempe legis librojn de Sankta Johano de la Kruco. En 1942, post la morto de sia patro, Karol komencis teologian studadon en la sekreta

Metropolita Porpastra Seminario de la Jagelona Universitato en Krakovo.

Februare 1946 li fariĝis diakono kaj novembre 1946 laboris, kiel paroĥa pastro, ĉe la krakova preĝejo al Sankta Floriano. En la kvindekaj jaroj Karol Wojtyła ricevis sciencajn titolojn de doktoro kaj docento. Li havis prelegojn pri etiko en la Katolika Universitato en Lublin. En 1958, la papo Paŭlo la 6-a nomigis K. Wojtyła episkopo. Jam en tiu ĉi momento li

akceptis sian devizon: „Totus Tuus” (Tute via), ligitan kun Maria la Plejsankta.

Dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj li verkis siajn plej famajn librojn pri etiko: “Amo kaj respondeco”, kaj “Persono kaj agado”.

En 1963 li fariĝis ĉefepiskopo de Krakovo. De 1967 li estis kardinalo de Pollando. Neniam li estis memfida, ĉiam li kondukis modeste. Li havis multajn junajn kaj maljunajn amikojn. Li ĉeestis montarajn ekskursojn kaj neoficialajn renkontiĝojn kun junularo.



En oktobro 1978, post 33 tagoj de pontifikado, mortis la papo Johano Paŭlo la 1-a. Karol Wojtyła estis elektita kiel la nova papo – la unua neitaldevena papo, de post 455 jaroj de la eklezia historio. Lia regado en Romo daŭris 27 jarojn. La papo vojaĝis eksterlanden kiel pilgrimanto 102 fojojn. Li vizitis 135 landojn, prezentis 898 predikojn, eldonis 14 enciklikojn, nomataj latine “adhortatio” (dokumento pri la ordinara papa instruado). Dum lia regado sur la “Petra trono” estis kanonizitaj 478

personoj.

Ni, poloj, kun grandega timo, travivis la tagon de la 13-a de majo 1981, kiam Mehmed Ali Agca pafis al la papo. Sekvontjare, la resanigita posteulo de Sankta Petro veturis al Fatima por danki al Maria Virgulino pro miraklo de sia savo.

Post tiu ĉi evento, la Papo neniam havis tiom da energio, kiel antaŭe. Sed, kvankam lia stomako doloris kaj li havis Parkinson-malsanon, li ĝis la fino de sia vivo laboregis kaj vojaĝis tra la mondo.

Li konis diversajn lingvojn. De tempo al tempo, dum gravegaj paroladoj, li uzis ankaŭ Esperanton, por fari mallongajn konkludojn de sia prediko. Iamaniere ni povas diri: la papo Johano Paŭlo la 2-a, pro siaj vojaĝoj, pro amo al la internacia etoso kaj al homoj – estis kvazaŭ esperantisto. Eble li renkontiĝos kun ni. Mi kredas, ke li rigardas nin de la ĉielo kun la kreinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof.

Rolvortetoj “De” - De rilate al verbo – unua parto

Formovo

Kiam *de* rekte rilatas al verbo, ĝi normale montras lokon, kie komenciĝas movo:

- *Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo.* La moviĝo komenciĝis ĉe la avo, iris for de li, kaj direktiĝas nun al la onklo.
- *La vento forblovis de mia kapo la ĉapon.*
- *Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko.*
- *Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi.*

Por klareco oni povas je bezono uzi *for de* aŭ *disde*: *La polico prenis la ŝtelitan monon for de la rabisto / disde la rabisto.* Se oni dirus: *...la ŝtelitan monon de la rabisto*, oni povus eble pensi, ke temas pri apartena *de*: “...la ŝtelitan monon, kiu apartenis al la rabisto.”

Origino

Rilate al verbo, *de* povas montri originon, kio estas simila al formovo:

- *De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon.*
- *Saĝa filo lernas de la patro.*
- *La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo.* Izraelo estas ilia prapatro.
- *Donu al mi manĝi de ĉi tiu ruĝa kuirajo.*

Kaŭzo

Rilate al verbo, *de* povas montri kaŭzon, ĉar kaŭzo similas al origino:

- *Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto ...pro timo... pro honto.*
- *Mi eksaltis de surprizo.*

Por kaŭzo oni tamen normale uzas *pro* kaj iafoje *el*.

Malsimileco k.t.p.

Rilate al verbo, *de* povas montri malsimilecon, distingon, apartecon, malproksimecon, disecon:

- *Per kio diferencas via amato de aliaj amatoj [...]?*
- *Mi povus diferenciĝi la saĝajn de la malsaĝaj!*
- *Kial Vi kaŝas Vian vizaĝon de mi?*
- *Nun mi iom liberiĝis de la plej urĝaj el miaj kolektiĝintaj laboroj.*
- *Trankviliĝu de l' batado, ho, mia kor'!*

Roman Dobrzyński

Kial kvarpiede?

monologo el la kabaredo „Verda Simio”



Sinjoro Malski kutimis paŝi kvarpiede. Ĉiumatene li kuris al sia oficejo kun ombrelo inter la dentoj, laŭvide simila al leporo aŭ eĉ kanguruo. Dum liaj piedoj estis normale armitaj per ŝuoj, siajn manojn li vestis per specialaj gantoj kun kalkanumoj. Per unu lerta salto li scipovis entramiĝi kaj, lokiĝinte sub iu benko, li trankvile legis gazeton, sen suferi interpremon, kiu en la varsoviaj tramoj estas vere malagrabla.

Okazis ne malofte, ke iu pasaĝero dolorige surpaŝis lian manon, sed malgraŭ tio li plene konvinkiĝis, ke moviĝado per kvar membroj donas multajn avantaĝojn. La kvar piedoj ekskluzivigas la danĝeron de stumblo kaj falo; la horizontala pozicio de la korpo permesas al la okuloj pli ekzakte vidi truojn en la vojo kaj valorajn objektojn. Sinjoro Malski trovis foje oran ringon kun diamanto. Li facile enrampas sen bileto al kinejo kaj printempe... Ho, printempe li kapriolas sur herbejo kaj flaras florojn sen la laciga klinado.

Tiujn ĉi avantaĝojn de la kvarmembreco observis kelkaj aliaj homoj kaj provis imiti sinjoron Malski. Ili studis tian manieron sin transporti, tamen kun magra rezulto. Ili moviĝis mallerte kaj kun limaka malrapideco. Mi mem partoprenis kelkajn kursojn de kvarmembra moviĝado. Por salti perfekte per kvar piedoj oni devas havi flekseblan vertebraron, saltkapablajn gambojn kaj same fortajn brakojn. Mi komencis regularan gimnastikon. Se vi vidus, kiom da peno, persisto kaj ŝvito bezonis tiuj ekzercoj!

Post la kvinjara ekzercado mi subite ekstaris vertikale kaj surprize konstatis, ke per du piedoj estas multe pli facile marŝi. Baldaŭ mi renkontis sinjoron Malski saltanta. Li ne rekonis min, ĉar mi portis novajn ŝuojn, sed mi mem alparolis lin:

- Estimata sinjoro, ĉu ne estus pli oportune marŝi per du piedoj? Unu propra kaj la alia internacia?

- Ne, mi preferas esti poligloto.

1958

Saĝulaj pensoj

Andreo Bach

Epoko de konsumado

Ni vivas dum interesa periodo. Je nia dispono estas granda kvanto da varoj kaj servoj. Kaj ni aĉetas ilin senpripense kaj tre avide. Danke al la interreto kaj novaj teknologioj, nia vivo treege ŝanĝiĝis. Ni do akceptu la ŝokan veron. Koloraj reklamoj, restvendadoj, la interreto – jen kio kaptas nian atenton tiamaniere, ke ni opinias, ke ni bezonas ĝuste tion kaj ke sen tiu nova inventaĵo ni ne povus plu vivi.

La epoko de konsumado kaj interreto estas danĝera ĝuste pro tio, ke ni ne povas rezigni pri senĉesa aĉetado, ĉar ŝajnas al ni, ke ni ja vere bezonas ĉiam pli novajn luksaĵetojn. La 21-a jarcento estas nomata „jarcento pri konsumado”, dum kiu nek petrolo, nek scio, kaj eĉ nek mono, sed ĝuste la homo mem progresigas ĝin. La homo mem estas la kaŭzo de la spezo de mono, ĉiujare aĉetante pli kaj pli.

Dum iu el intervjuoj la konata aktoro Denzel Washington diris: „Se vi hodiaŭ ne legas novaĵojn, vi ne estas konscia, kaj se vi legas ilin, vi estas malbone informita. La problemo estas, ke nuntempe ĉiuj volas esti LA UNUAJ, anstataŭ esti VERAJ. Aperas iu novaĵo kaj ne gravas, ĉu ĝi estas vera, por kiu ĝi estis maloportuna, kiun ĝi mortigos. Plej gravas, ke oni estu la unua, kaj oni vendu la novaĵon plej altpreze.

Simile aspektas ĉiujara, la plej granda forvendado en Singapuro. Homoj venas multe pli frue, tranoktas tie por esti la unuaj kaj gajni deziratan objekton. Sed, multaj novaj modeloj verdire ne estas pli ekskluzivaj aŭ pli bonaj kompare kun la antaŭaj. Dum iu stratesplorado,

multaj homoj estis tiel blindaj, ke ricevinte por kompari du malnovajn modelojn de komputoj, unu el ili ili opiniis multe pli moderna, rapida, malpeza, maldika k.t.p., kaj ili estis tute certaj pri siaj unuarigardaj opinioj.



Fakuloj opinias, ke konsumantoj ŝatas esti trompataj, kaj ili estas pro tio tre fieraj, ili aĉetas gvidante sin per reklamoj, kvankam ili bone scias, ke la unusola celo de reklamo estas pura profito. La homaro falis jam tiagrade, ke ni ne miras, kiam en iu reklamo de komputo ni vidas, kiel junulo eniras perforte la domon de sia najbaro kun pafilo enmane kaj forprenas ties aparaton, sed tiam la atakita viro proponas al la krimulo sian filon anstataŭ sia amata luksaĵeto.

Sciencistoj alarmas: LA HOMARO FALAS KUN GRANDA RAPIDECO! Homoj jam ne volas lerni kaj disvolviĝi. La nuntempa generacio ne estas scivolema pri la mondo, ne estas kreiva. Ĉie dominas la avido pri konsumado. Laŭ esploroj de la firmao Deloitte de 2016, ni neniam estis tiagrade dependaj de niaj komputoj. Laŭvice, la firmao Pew Research Center anoncis, ke la nombro de la uzantoj de Fejsbuko atingis 2 miliardojn, kaj ĉiu el ili averaĝe estas en la reto pli ol 50 minutojn tage.

Unu el avantaĝoj de la sociaj retejoj estas, ke ili donas la impreson pri aparteneco kaj komuneco, eliminante samtempe la bezonon komunikiĝi vid-al-vid. Ni komencis kaŝiĝi malantaŭ la belaj mienoj de niaj fotoj, ni transportis nian vivon al la virtuala mondo, sen rimarki tion. La teknika

progreso, kompreneble, estas bona afero, sed fariĝi ties sklavo, jam ne estas io bona. Ĉiu bona afero, trouzata, alportas damaĝojn.

Gravas, ke ni trovu ekvilibron. Eble venas tempo rekonsciiĝi? Eble estus bone rezigni pri komputono kaj denove eklerni resenti emociojn anstataŭ altruditajn al ni dezirojn? Ja la vivo estas tiel bela, ĉu valoras ŝanĝi ĝin je tiu virtuala? Eliru el via ĉambro kaj renkontiĝu kun proksimuloj persone anstataŭ rete. Eliru promeni kun la infano anstataŭ kun komputono! Tutsimple rigardu ĉirkaŭen...

Poŝkesto



Aleksander Korĵenkov, Fino de E-revuo "La Ondo de Esperanto"

La oktobra kajero de "La Ondo de Esperanto" estos jubilea – ĝi havos la numeron 300. Sed ĝi estos la lasta jubileo de "La Ondo", kiu aperos nur ĝis la fino de la 2019a jaro. Legu pli en la novaĵretejo La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2019/09/ondo-49/>



Teresa Pomorska, Kristana Kongreso en Legnica (kadre de 70-a KELI-kongreso)

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj volas aktive pasigi tempon en kristana etoso. La kongreso komenciĝos sabate la 8-an de aŭgusto 2020 de komuna vespermanĝo kaj finiĝos per komuna matenmanĝo la 15-an de aŭgusto 2020.

Dum la kongreso, interalie, atendos vin:

- komunaj preĝoj kaj diservoj
- komuna kantado kaj ludado
- prelegoj kaj diskutoj
- koncertoj
- ekskursoj por konatiĝi kun interesa ĉirkaŭaĵo

La favorsituo de la urbo en la centro de Malsupra Silezio ĉe la kruciĝo de eŭropaj transportaj vojoj estas tre grava por ĝia ekonomia kaj turisma disvolviĝo. Same gravas la proksimeco al Germanio kaj Ĉeĥio. Legnica situas ĉe historiaj itineroj: cisterciana vojo kaj komerc-pilgrima Reĝa Vojo (Via Regia) komenciĝanta en Portugalio kaj finanta en Ukrainio. Ankaŭ hodiaŭ la urbo estas grava trafika nodo (aŭtovojo A-4 de oriento okcidenten, kaj nacia aŭtovojo de nordo suden) kaj fervojlinio Wrocław-

Dresden. Pro tio Legnica estas facile atingebla de Vroclavo per trajno, kiu trafikas, ĉiuhore aŭ eĉ pli ofte aŭ de okcidenta ĉelima urbo Zgorzelec/Görlitz.

La kongresejo estos Eklezia Porpastra Seminario en Legnica.

<https://keli.sea-vroc.eu/>



Bharat, Kvara Speciala Ekskurso al Nepalo en 2020j.

La Nepala Esperanto-Asocio anoncas 12-tagan specialan ekskurson ekde la 26a de februaro ĝis la 8a de marto 2020. Ĉiuj scias ke NEspA okazigas la Himalajan Renkontiĝon, ĉiun duan jaron (ĉi-jare ni sukcese okazigis la 12an). La Himalaja Renkontiĝo signifas plejparte piedvagadon en la montaro, sed tio ne taŭgas al ĉiuj aĝgrupoj. Multaj samideanoj volas viziti Nepalon, sed timas tian marŝadon. Jen jam la kvaran fojon ni okazigos, do, ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj, atingeblaj per buso kaj situantaj en belaj pejzaĝoj, inkluzive la famajn montarojn videblajn en Katmanduo, Ĉitaŭan Nacian Parkon, Lumbini (la naskiĝloko de Budao), Palpa (tre fama loko por speciala ĉapo nomata Topi en Nepalo), Pokhara kaj Bandipur Korikha (la plej bela kultura hejmmrestado en Nepalo). La ĉefa celo de la programo estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke.

Nepalo estas ebriiga miksaĵo: fascina lando de antikva historio, viglaj kulturoj kaj popoloj, biodiverseco kaj majestaj pejzaĝoj. Ĝiaj geografiaĵoj etendiĝas de belaj altaj neĝpintoj en la nordo, al malpli altaj montoj en la mezo kaj al bela, fekunda ebenaĵo kun multaj arbaroj en la sudo. Situante inter Tibeto (Ĉinio) kaj la Ganga Ebenaĵo (Barato), Nepalo, tra sia historio sentis la influon de ambaŭ tre diversaj civilizacioj, sed samtempe kreis identecon por si mem. La lando havas preskaŭ 28 milionojn da loĝantoj, parolantaj 125 lingvojn aŭ dialektojn.

Okdek procentoj de la nepala popolo sekvas hinduismon, sed la lando estas oficiale sekulara, kaj fakte, lando de multaj religioj. La templo de Paŝupatinath en Katmanduo estas unu el la kvar plej gravaj lokoj por adorantoj de Ŝiva. Budho, la "Lumo de Azio," naskiĝis en Lumbini, kiu situas en la suda ebenaĵo, farante de Nepalo sanktan celon por pilgrimantoj. La multaj etnoj ofte kultas proprajn diojn. Kvar lokoj de Nepalo estas agnoskitaj de UNESCO kiel mondheredaĵoj. En la unua, la valo de Katmanduo, reliefiĝas la urbo de Bhaktapuro, la reĝaj placoj de Katmanduo kaj Patano, la stupaoj de Svajambunath kaj Baŭdhnath, la temploj de

Paŝupatinath kaj Ĉangu Narajan. La dua kultura heredaĵo estas Lumbini. Plie estas la naturaj zonoj Everest Nacia Parko (1.148 km²) kaj Reĝa Ĉitaŭan Nacia Parko (932 km²), kiun ni vizitos dum la ekskurso.

Kotizo: 950 eŭroj por 12-taga ekskurso, restado en bonkvalita hotelo, tri manĝoj ĉiutage, enirpagoj en diversaj lokoj kaj transportado.

La menciita kotizo validas por dulita ĉambro. Se vi deziras unulitan ĉambrom (por la tuta periodo), bv. aldoni 200 eŭrojn al la menciita sumo. La kotizo inkluzivas manĝojn kaj loĝadon dum la tuta programperiodo. La programeroj ŝangeblas pro neatenditaj kialoj. Bv. sendi la aliĝilon al la Nepala Esperanto-Asocio kaj samtempe pagi

Nepala Esperanto nespera.1990@gmail.com

Bankkonto: Nepal Esperanto Sangh, 00201000494754000001, savings account, SWIFT CODE : NEBLNPKA, Nepal Bank Limited, New Road, Kathmandu, Nepal.

Ĉe UEA - Nepala Esperanto Asocio - Neea-j

Plenan aliĝilon kaj priskribon petu ĉe redakcio de PE.



Maria Majerczak, Esperanto-kurso por verkemuloj - gvidota vive, en Interreto

Esperanto-kurso de la Jagelona Universitato por verkantoj de artikoloj, blogoj, por tiuj, kiuj aspiras beletran verkadon aŭ simple, pli bonan skribadon en Esperanto. La skribaj aktivaĵoj ampleksos leksikon, gramatikon kun speciala atento al sintakso, zorgan laboron pri stilo. La programo respektos la individuan stilon de la partoprenantoj, okazos laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la Esperanto-literaturo. Parto de la kurso estos dediĉita al plibonigado de la parolkapablo - dezirantoj povos elekti tiun eblon.

5-monata kurso (decembro 2019- aprilo 2020), kun lecionoj okazantaj 1-foje semajne. Niveloj: B2-C1 (meza kaj supera).

La lernado okazos en Interreto, vive. La studanto partoprenas ĝin, estante en sia hejmo. Ĉiusemajne oni renkontas en la studgrupo esperantistojn el pluraj landoj.

La kurson gvidos sperta universitata instruistino, Maria Majerczak.

La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

La diversajn internaciajn kursojn de la Jagelona Universitato finis multaj esperantistoj el 5 kontinentoj. Parto de la studantaro partoprenis plurajn kursojn.

Limdato por aliĝi: 30 novembro 2019 (aŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj).

Pli da informoj pri la kurso: <https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNl-nc3VJhi44f6NjbzDuaZvepiVRi0BYdEW5c/preview>

Se, studinte ĉiujn informojn en la ĉi-supre indikita retpaĝo, vi decidis ALIĜI, bv. skribi al: esperanto.instruado.jag.univ.pl@gmail.com. Mi kore invitas vin, Maria Majerczak, gvidantino de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato.



Klubano, Kluba vivo

Antaŭ kelkaj semajnoj oni instigis min por okupiĝi pri klubaj ttt-paĝoj. Mi mem taksas, ke en moderna organizaĵo devas bone funkcii TTT-paĝoj kaj fejsbuko. Ili ambaŭ devas esti aktualaj kaj preskaŭ seneraraj.

Dum lastaj du jaroj neniu okupiĝis pri nia kluba TTT-paĝaro kaj mi taksis la aferon facila. Mia optimismo finiĝis kiam mi rimarkis, ke mia antaŭulo lasis la paĝaron vastan kaj riĉan. Ĝin mi ne povas eĉ legi unu fojon monate. Kompreneble por eviti erarojn mi tion devu fari. Dum tiu momento mi ekkomprenis, ke kontrola tasko estas ne nur por unu persono sed por tuta klubo.

Tio kaŭzis, ke dum iu kluba renkontiĝo mi petis helpon. Sufiĉis nur legi tekstojn esperante kaj nacilingve. Mi proponis, ke klubanoj dividu la paĝaron por, ke ĉiu havu malgrandan tekston. Tiel dividita paĝaro povas esti tralegita kaj korektita nur dum du semajnoj. Ankaŭ la kunlaboranto povus proponi iujn ŝanĝojn. Dum la renkontiĝo mi aldone petis la gekolegojn, ke ili skribu artikolojn, se ne esperante eblas skribi pole ĉar mi pretas traduki.

Post mia propono kia estis reago de geklubanoj? Estis nur kelkaj kiuj nenion diris sed mi supozas, ke ili estas pretaj helpi. Multaj respondis jene: Mi malbone konas esperanton mi ne povas helpi. Aliaj trovis aliajn respondojn por eviti la laboron. Post tio mi rimarkis, ke kun la problemo mi restis preskaŭ sola kaj miaj gekolegoj ne estas tiel aktivaj kiel ili devas esti.

La antaŭe priskribita kluba evento kaŭzis, ke en mian kapon venis demandoj: Pro kio miaj geklubanoj estas tiel neaktivaj, ĉar legado de e-tekstoj estas bona rimedo por progresi lingve? Kion neĝustan faris ĉefoj de mia klubo, ke la geklubanoj estas neaktivaj. Kiamaniere gvidi la kluban grupon por aktivigi la partoprenantojn. Ĉu manko de nia aktiveco ne estas kaŭzo, ke esperantistoj-junuloj marŝas iom apude? Al tiujn demandojn mi

mem ne scipovas respondi sed verŝajne en la respondoj estas solvo por scii kion ni devas plibonigi en niaj kluboj.

P.S. La artikolo estas danko al mia antaŭulo pro lia granda laboro pri niaj klubaj ttt-paĝoj. Mi pardonpetas, ke mi tiam ofte eĉ ne povis legi faritajn de li artikoletojn.

Kalendaro

Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj en najbaraj landoj en 2019 kaj 2020

9-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
6-7. 12.2019	4-a Esperanta konkurso "Vortbeleco en Esperanto" en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl/
27.12- 3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Karlów	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
25.07- 1.08.2020	93-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Sennacieca Asocio Tutmonda https://www.facebook.com/events/649411952208990
1-8.08. 2020.	La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado).	Universala Esperanto-Asocio uea.org
8-18.08. 2020	Kristana Kongreso en Legnica (kadre de 70-a KELI-kongreso)	Silezia Esperanto-Asocio. Kristana Esperantista Ligo Internacia https://keli.sea-vroc.eu/
17-24.07 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando).	Universala Esperanto-Asocio uea.org

Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

17-20.10. 2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: cea@esperanto.cz
6-13. 04.2020	36-a Printempa Esperanto Semajno (PSI) 2020 en Wittenberg -Germanio. Granda internacia renkontiĝo por la tuta familio	Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstrasse 25, 10965 Berlin, Germanio.
01-10.05. 2020	"Mirinda Lviv" en Lviv – Ukrainio	Volodimir Hordijenko, Kijivo volodomir@ukr.net
13-21.07. 2020	43-a SEFT Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro en Thomsdorf - Germanio	Vorsitzender Esperanto-Klub Schwerin André Christian Weber, gerd.gallium@mailbox.org
18-26.07. 2020	Somera Esperanto-Studado (SES) kaj Somera Esperanto-Programado (SEP - La dua Esperanta kodummaratono en Kroměříž - Ĉeĥio	E@I, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio ses@ikso.net
17-20.09. 2020	2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo en Kassel - Germanio Laborateliere "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj"	w.guenther.esperanto@web.de

Inter eksterlandaj Esperanto-renkontiĝoj en 2020 precipe unu ŝajnas esti interesa kaj indas prezenti ĝian priskribon. Jen la informo, kiun preparis organizantoj de „2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo en Kassel” (Red.)

La temkampoj estos "La Mondo de Laboro", "Hobioj kaj Libertempo", "Kleriĝo kaj Lingvoj", "Familio kaj Junularo", "Religio kaj Etiko", "Politiko kaj Juro", "Sano kaj Socialo", "Sporto, Muziko, Arto".

Malgraŭ la klimatokrizo, la migrantoproblemoj, la Briteliro kaj okupiĝado pri naciaj anstataŭ pri eŭropaj interesoj Eŭropo nun kiel antaŭe estas alianco, portata/apogata de multaj civitanoj - surbaze de laŭeble pacaj kaj demokratiaj principoj kaj aktuale multflanke batalanta kontraŭ la resursa kaj sistema degradigo de la vivmedio sur nia unu komuna Planedo... Eŭropo devas esti Eŭropo de la gecivitanoj.

La Eŭropa Civitana Renkonto seriozas pri ĉi celo kaj volas spertebligi Eŭropon por ĉiuj.

La iniciatintoj de la ECR estas plurkampe engaĝigantaj geeŭropanoj. La renkonto estas partipolitike, ekonomie kaj religie neŭtrala. Ĝi fariĝu daŭripova platformo por interŝanĝado pri komunaj kaj diferencoj kaj montru, ke diverseco povas esti riĉiĝo por la propra vivo kaj povas bone harmonii kun unueco. La renkonto konsistas el inform- kaj laboratelieroj pri multaj kulturaj kaj socialaj kampoj/temoj (historio, kleriĝo, lingvoj, juro, homaj rajtoj, demokratio, civitana partoprenado, honoroficeco, sporto, artoj, homaj rajtoj ktp.) kaj ampleksa kromprogramo. Estos laŭbezone interpretistoj.

Estos ateliero pri Esperanto, ties aktualaj perspektivoj, la lingvopolitiko de la EU kaj ekspreslingvokurso. La hejmpaĝoj pli kaj pli ĝisdatigos/plidetalingos la programon.


Kontakto pri la renkonto: office@kassel-ebb.eu (Oni povas libere peti informojn kaj ankaŭ jam nun senformulare aliĝi tie. Por eksterlandanoj estos subvencioj por la vojaĝo.)

Kontakto per/pri Esperanto: Wolfgang Günther.

Oni eldonis


Mordeĥaj Gebirtig
“**Adiaŭ Krakovo**”

Tradukis Mikaelo Bornŝtejn
Redaktis Tomasz Chmielik
Bjalistoko, Świdnik, Kraków,
Lublin 2019
ISBN 978-83-63698-33-1
Grandeco B5, malmola kovrilo



Menaĥem Kipnis
„**Historioj el Ĥelmo**”

Tadukis kaj redaktis
Tomasz Chmielik
Bjalistoko, Świdnik, Lublin 2019
ISBN 978-83-63698-54-6
Grandeco B5, malmola kovrilo



Uri Orlev


„Kuru, knabo, kuru”

Tadukis Tomasz Chmielik

Świdnik, Lublin 2019

ISBN 978-83-63698-36-2

Grandeco B5, malmola kovrilo



„Bjalistokaj kajeroj nr 9”

Verko de 9-a lieteratura konkurso

”Esperanto ligas Homoj” por rakonto

sub titolo „Mi estas civitano de la

mondo”


Książnica Podlaska, Białostockie

Towarzystwo Esperanckie,

Białystok 2019

ISBN 978-83-66137-13-4

Grandeco A5, mola kovrilo



Gazetaro pri Esperanto-movado

Okaze de 160 naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof kaj 20-a Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, en tutlandaj kaj lokaj retejoj aperis tri artikoloj. La plej longa – intervjuo kun vicprezidantino de PEA Agnieszka Mozer aperis en la retejo “polsatnews.org”. Dua artikolo aperis en la retejo “dzieje.pl”. Loka bjalistoka retejo Kurier Poranny prezentis 20-ajn Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn. Televida programo TVP-3 en Bjalistoko, sabate la 14-an de decembro je 18:30 prezentis kelkminutan filman raporton pri Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj.



<https://dzieje.pl/search/zamenhof>


0081 Odebrane - WP F... X Esperanto - wymyślił go polski Żyd okulista. Dziś mówią nim nawet w Japonii

https://www.polsatnews.pl/wiadomosc/2019-12-15/czeka-nie-ruszac-esperanto-...
 Często odwiedzane Pierwsze kroki Zakupy w necie 2020 GPK - Arkusze Go... vortaro.net LanguageTool - Spell...

Polska Świat Biznes Technologie Moto Sport Kultura Wideo **TWÓJ NEWS** Przylidź zdjęcie lub film

Esperanto - wymyślił go polski Żyd okulista. Dziś mówią nim nawet w Japonii

wczoraj, 08:00 Polska



Najnowsze Popularne

TYLKO U NAS "Efekt paradoksalny" - Tusk o brexitie. Wywiad w programie "Dzień na Świecie" w Polsat News

- Jan Śpiewak spotkał się z Andrzejem Dudą. "Tematem rozmowy była moja sytuacja prawna"
- ZDRODŁA** Koszmarny wypadek bmw. Auto rozpadło się na kawałki, kierowca wypadł [ZDJĘCIA]
- WIADOMI** "Kładę mnie na podłogę, w samych gaciach". Jacek Miedlar o kulcach akcji ABW
- "Łańcuch Świata" w obronie sędziów w Poznaniu. "Władza sądownicza musi być niezawisła"
- Kosiniak-Kamysz: najważniejsze jest obecnie zjednoczenie Polaków
- ZDRODŁA** Volkswagen Golf staranował bramę i

<https://www.polsatnews.pl/wiadomosc/2019-12-15/czeka-nie-ruszac-esperanto-wymyslil-go-polski-zyd-okulista-dzis-mowia-nim-nawet-w-japonii/?ref=slider>


Najnowsze wiadomości z kraj... Wyniki wyszukiwania | dzień... XX Białostockie Dni Zamenhofa... poranny.pl/xx-bialostockie

https://poranny.pl/xx-bialostockie-dni-zamenhofa-160-rocznica-urodzin-ludwika...
 Pierwsze kroki Zakupy w necie 2020 GPK - Arkusze Go... vortaro.net LanguageTool - Spell...


Kurier Poranny Wiadomości Wypadek Sport PorannyTV Zdrowie Dom Kultura Wpisyj

XX Białostockie Dni Zamenhofa. 160. rocznica urodzin Ludwika Zamenhofa, twórcy esperanto (zdjęcia)

(UK) · 14 grudnia



160. rocznica urodzin Ludwika Zamenhofa, twórcy esperanto. Julia Januszkiewicz



Wystawy, wykłady, koncerty, msza w języku esperanto, tort urodzinowy Ludwika oraz wiele innych interesujących wydarzeń. Tak świętowaliśmy rocznicę 160. urodzin Ludwika Zamenhofa oraz 100. rocznicę powstania ul. L. Zamenhofa w Białymstoku. Trwają XX Białostockie Dni Zamenhofa. W niedzielę zaplanowano wycieczkę do Tykocina.

ZOBACZ GALERIĘ (48 ZDJĘĆ)

JEEP RENEGADE
OD 69 900 ZŁ BRUTTO

OSTATNIA SZANS NA NOWEGO JEEPA W TAKIEJ OFERCIE!

SPRAWDŹ

Najnowsze

<https://poranny.pl/xx-bialostockie-dni-zamenhofa-160-rocznica-urodzin-ludwika-zamenhofa-tworcy-esperanto-zdjecia/ar/c1-14655523>

El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

Esperanto - Forumo kaj Tagoj de A. Grabowski, Varsovio 04.06.1988


La jaro 1988 estis anoncita kiel jaro de Antoni Grabowski. Okaze de ĉi tiu evento en Varsovio, la 4-an de junio 1988, okazis Esperanto-Forumo kaj Tagoj de A. Grabowski. Antaŭtagmeze okazis poezia konkurso. La konkurson malfermis Jaroslaw Parzyszek. Partoprenis gelernantoj el Pollando kaj eksterlandaj gastoj. Krome, koncertis Todor Atanasov el Bulgario. Jerzy Rządcki gvidis la poezian konkurson. En la konkursa komisiono estis, inter aliaj, Ela Malik kaj Krzysztof Śliwiński. Post la konkurso okazis solena malfermo de la Ekspozicio pri Antoni Grabowski.

Samtage posttagmeze, okazis solenaĵo en la varsovia Reĝa Kastelo, kie oni oficiale inaŭguris la Fondumon Zamenhof en Bjalistoko kies ĉefa agadcelo estis kolekto de mono por konstrui kulturen Zamenhof-Centron. Partoprenis en tiu evento la ministro pri Kulturo K. Czapka kaj la ĉefministro Roman Malinowski, ĉeestis ankaŭ konataj esperantistoj: H. Tonkin, R. Dobrzyński, L. Kosieniak, A. Pettyn, A. Sochacki kaj aliaj.

La Fondumo estas oficialigita per notaria akto, subskribita la 21-an de decembro 1987 en la Ŝtata Notaria Oficejo.




Renkontiĝo en reĝa kastelo. Dua de maldekstre Humprey Tonkin



La renkontiĝon malfermis Jarosław Parzyszek



Deklamas W. Giec el Gdańsk



Ekspozicio pri Antoni Grabowski



Vic Ministro de Kulturo K. Ćapka oficiale prezentas dokumento pri fondo de la Fondumo Zamenhof



Jurio de poezia konkurso



Salono dum poezia konkurso



55-a Baltiaj Esperanto Tagoj en Panevezys en Litovio



Joachim Kołpanowicz post koncerto en krakova operejo Floroj por majstro en Łódź

NIA FOTOGALERIO



23-a Glivicea Rendevo de Praktikantoj kaj Uzantoj de Esperanto GRUPE-2019